

Ciudadano

N.º 3
"SEVILLA FANZIA"

СЪЗДАНИЕТО


VERKITA EN LA PLEJ BONGUSTA LANGVO. JES, LANGVO!



Numero 3

Auguston

1985



ĈIESREVUINON ELDONAS

SEJLO

str. Pozo, 3
41003 - SEVILLA
Hispanio

(paĝon 210 en jarlibro).



PAKO LA DUA

NIA TRE DEMOKRATIA, TRE POPULARA,
TRE AMATA, TRE KABEEMA, TRE HONESTA
ĈEFKUNORDIGANTO.

HATL, ĈEFKUNORDIGANTO!

KUNLABORANTOJ

BARBE

La bufo "kiu flugas"

La fotisto vidul abirdet'

Kolektivo mi.

Andreo Sidworth

Pako la tria

Miss Mazarrón

Estraro de D.E.D.O.

Ed la blond

M. Boĝer'

PROTAGONISTOJ

LKK-anoj de 45a H.K.de E-o

Urbestro de Marinaleda

La polico

Reagano kaj Gorbaĉevo

Thatĉero kaj Fraga-o

La mazaronanoj

La blua kaj pura maro de

Kartaĝeno, kaj...

Leteroj al Ĉ-R

Mia amiko Amador Diaz montris al mi vian revuon "Ĉies-revuno", kaj plaĉas al mi ĝia ikonoklasteco. Kiel studento, mi ne havas sufiĉe da mono, kaj mia konatiĝo kun la ĉesperantaj revuoj estas pro la afablo de mia amiko.

Mi kuraĝas sendi al vi limerikon pri via urbo, ĉu ĝi taŭgos por via revuo?

Via admiranto,

Andreo Sidworth,

DANKON PRO VIAT
VORTOJ, KIUJ TRE ANIM
NIN DAŬRI ĜI NIAN
LABORON

KANTAJOT

Tombejo de aŭtomobiloj

Ja pejzaĝo abstrakta,
streĉiĝas ja la aer',
sur feraĵoj retorditaj, rustiĝitaj
falas sun'.

Motoroj silentaj, la artificia sonĝ',
ja la rapidec' ne ekzistas en tiu lok'
ensorĉita.

Ja en la tombejo de aŭtomobiloj 'stas mi.
Ja en la tombejo de aŭtomobiloj 'stas mi.

Por ĉio esti preta, ekii rememori ja,
sen ekzisti mov'eltiri el aŭto
kilometrojn.

La herbo 'stas kreskinta sube de la radoj.
Min l'odor' de pneumatikoj brulantaj konfuzigas.

Ja en la tombejo de aŭtomobiloj 'stas mi.
Ja en la tombejo de aŭtomobiloj 'stas mi.

La ombroj

Ĉiam apartis mi volvita duonlume,
mi ne elstaris pro ekzotismo en mia danco.
Kiu ŝtis? Kiu in'? kiu ruinigis
miajn noktojn, miajn sonĝojn, kiu 'stis?
Mi ĉirkaŭiĝis daŭreolo de mistero
ĉar neniu eniris regnen de miaj ombroj.
Kiu 'stis? Kiu in? kiu igis
mian fevron, histerion, kiu 'stis?

La ombroj, la ombroj
mia rifuĝo kontraŭ via malvarm'.

Vian konfuzon vekis mi per mia ĉeesto.
Mi estis tie, kie lumo ĝi finiĝas.
Kiu 'stis? kiu in'? Kiu malheligis
mian korpon, animon... kiu 'stis?

Tradukita de la ĉefkunordiganto el la muzika
grupo 091.

Kvar samideanoj el Seviljo (mi inter ili) ĉeestis la 45an Hispanan Kongreson de Esperanto, kiu okazis en Kartageno. Ĝi estis la unua, en kiu mi partoprenis, kaj se la dua estos tia, kia ĉi tiu, mi foriros el Esperantio, ĉar tio ne povis esti kongreso, ĝi estis okazaĵo senorda, freneza kaj preskaŭ parapsikologia. Mi rakontos.

Ni vojaĝis malgrandegaŭtomobile du fazojn: lan de Seviljo ĝis Mazarono (pli-malpli 600 km-ojn) kaj 2an de Mazarono ĝis Kartageno (2 aŭ 3 lumjarojn); jes, jes, en la mapo aperas Mazarono kaj tuj Kartageno, sed ne kredu, ĉar Mazarono estas "alia mondo", pordo al alia dimensio, temspaca tunelo, fine loko malproksimega de ĉiuj lokoj, do malproksimega de Kartageno tiel, kiel ni povis konstati.

La rezultaton post tiu nehoma serperto ankoraŭ oni povas vidi, ni jam ne estas la samaj viroj, ni "mazaroniĝis" (neologismo, kiu povas signifi "degeneri per la influo de Mazarono"-n). Ni esploradis pri Mazarono, kaj tial ni scias, ke ekzistas la mazarona lingvo (tute nekomprenebla eĉ por la mazaronanoj mem), kaj ke ĝiaj loĝantoj estas neordinaraj; ni malkovris dum la vizito, kiun organizis la LKK-anoj, al mararkeologia muzeo romiajn hieroglifojn, kiuj difinas pli-malpli la loĝantaron de Mazarono; jen la traduko farita de fakulo:

Se havas kvin piedojn
kaj nur duonon da mano,
ĝi estas mazaronano.

Se neniam trinkas akvon,
kaj neniam manĝas panon,
ĝi estas mazaronano.

Se hare, veste, vizage
kaj haŭte ŝajnas cigano,
ĝi estas mazaronano.


Se agas kiel Gorbaĉevo,
kaj kondutas kiel Reagano,
ĝi estas mazaronano.

Ĉi tiu lasta difinero estis tradukata por nunaj mensoj, sed la ĝusta traduko estas jena:

Se agas kiel Kaligulo,
kaj kondutas kiel Nerono,
ĝi estas el Mazarono.

Tiel ni atingis Kartagenon, trafis la restadejo-kongresejon, kaj provis pretiĝi por ripozi. Ni duŝiĝis en bruega freneza kria etoso, kaj poste, kiam ni interparolis por difini nian tiu-noktan agadon, aperis estaĵo, kiun ni ne vidis, sed aŭdis ĝian virinoidan voĉon, kiu minacante blekis kastilie: "Ĉu vi ne silentos?! Ĉi tie estas personoj, kiuj volas dormi aŭ studi. Ĉu vi ne vidis la afiŝeton "NE ĜENU"?! Eble vi scias multe da Esperanto, sed ne hispanan lingvon!!!" Ni eknomis ĝin "La Sovaĝulino"; post kelkaj tagoj ni vidis ĝin, kaj batalis dialektike kontraŭ ĝi.

KARDAĜENO
SAMSEKSEMA URBO



BONVENIGAS
TUTKACE VIN

La venontan matenon ni pretigis nin por la "varmega akceptado" en la Urbodomo; do ni tute ne trinkis alkoholaĵojn por povi ĝui kaj ne malankigi la trinkaĵojn, kiujn ni es peris ricevi. Sed jen la elreviĝo, en la Urbodomo ni ricevis nenion por trankviligi nian abstinadsimptomaron; oni diris al ni, ke la Kartagena Urbodomo estas malriĉa.

Kartageno, Kartageno.
Kion vi faras per la mono?
Ĉu estus multe da peno doni iom al l'Urbodomo?

Ĉu vi kartakenaj uloj,
vi ne hontas pro la fakto,
ke piedbatis en la pugojn
al la amikoj de Esperanto?

Nur la kialon ni volas
de tia granda malam'
por povi pardoni vin.

Vi silentas, vi ne donas
al ni peceton da pan',
tial ni malbenas vin.

Tiu-nokte okazis la unua diboĉa nokto, en kiu kunvenis preskaŭ la tuta juna partoprenantaro. Malgraŭ la fantoma nokta etoso de Kartageno, ni sufiĉis por amuziĝi, ludi kaj drinki. Sendube la loĝantoj proksimaj de la Urbodoma Placo povas diri, ĉu mi verdiras aŭ ne.

Kompreneble poste alvenis alia tago, la tago por viziti La Mangon. Ni kaj tri malagaj samideanoj ekskursis libere vojaĝante per ordinara aŭtobuso. Kie mi diras "ordinara"-n, mi volas diri "publika"-n aŭ "neluita"-n, sed la aŭtobuso estis tute neordinara, ĉar ĝia antikveco transportis nin ĝis nia plej fora infaneco, antaŭ ol la malapero de tiaj aŭtobusoj el Seviljo.



LA KARDAĜENANTO

Dum la vojaĝo ekfloris el niaj mensoj la "mazaroneco", kaj ni komencis inventi la "ingajn vortojn" (neologismojn faritajn per la ĝis nun rara sufikso "ing"); mi skribos nur kelkajn ekzemplojn, ĉar ni intencas publikigi novan vortaron, kie aperos ĉiuj ili. Ĝi nomiĝos PIV (Por "Ingi" Vortojn):

- FINGRINO; nazo.
- PENISINGULINO: triamonda virino.
- MAMINGO: buŝo (ne de Alberto).
- CICINGO: buŝo de Alberto.
- INGI: 1) preni, trinki alkoholaĵon. (Ekzemple: Ĉu ni ingos iom?) 2) enmeti neleĝe kaj senhonte ion aŭ iun en iu loko, ejo, ujo, evento, ktp. (Ekzemple: Ni ingiĝis en la festeno.)
- INGE: fie (rilate la saluton): "Mi salutas vin inge kaj profunde." (El Manolo)
- VINGO: trompa haŭto de la eksterteraj ĉefroluloj de la usona televizia serio "V". (El Javi)



Meze de ĉi tiu semantika etoso ni alvenis al La Mango, kaj post ol "ingi" iom da biero, ni serĉis plaĝon por baniĝi. Malfeliĉe ni trafis plaĝon ĉe la Malpligranda Maro, kaj unue tri el ni baniĝis malgraŭ la fekaĵodoro, poste alia baniĝis, kaj ni kvar banis alian, legu:

Estis ja plaĝo purega
ĉe la Malpligranda Mar',
kaj ĉar ĝi tiel belas,
belkoloras kaj odoras,
ni amiĝis de ĝia haladz'.

Plenvestita kaj senhonte
fia Alberto luis boaton,
kaj li diris, ke atingonte,
kaj en akvon faligonte,
li gastigos per "kubato"*

"Ve al mi!" Alberto plendas,
kiam akvaĉon tuŝis li,
kaj ĉar ĝi tiel belas,
belkoloras kaj odoras,
baldaŭ mortos, ve al li!

* Alkoholaĵo farita per ĝino kaj kokakolao.

(Tuj kiam ni revenis Seviljon, a peris multe da aknoj sur la frunto de Alberto:

Plenigita, plenigita,
plenigita de aknaĉoj.
Ne estas ĝi malsano lita,
nur konsistas el fekaĵoj.)

Kompreneble ni foriris el tiu "purega" plaĝo, kaj post diboĉe manĝi kaj "ingi" pli da biero, ni baniĝis tute ĝue en nia amata Mediteraneo, per kiu ni puriĝis; sed Alberto ne sin banis, kaj certe tial lia frunta haŭto infektiĝis.

Ni revenis al Kartageno antikvegaŭtobuse kaj ene de granda veturil kolono. Feliĉe la LKK-anoj kompenzis tiun malagrablan sperton per senpaga noktomanĝado. Tiu-nokte ni konis Manolon, kiun ni havos la ŝancon korupti.

La sekvontan tagon okazis nenio interesa krom la junulara aranĝo. Tamen mi rememoras, ke mi ĉeestis la kunvenon de HEF, mi ne scias, ĉu tiu-tage ĉu alitage, sed tio ne gravas, temas pri la surpriza frankisma etoso de la kunveno:

- Estraro: Ni faris tion, ĉu vi aprobas?

- Ŝafaro: Jes! Jes! Jes!

- Estraro: Ni faros tion alian, ĉu vi konsentas?

- Ŝafaro: Jes! Jes! Jes!

- Estraro: Ni elspezis tiom, ĉu vi aprobas?

- Ŝafaro: Jes! Jes! Jes!

- Estraro: Ni elspezos tiom alia, ĉu vi konsentas?

- Ŝafaro: Jes! Jes! Jes!

Pri la junulara aranĝo meritas esti menciata nur la afableco de nia kolego Oscar, kiu gastigis nin per bongustega botelo da ananaso kun rumo. Dankon, ul'!



Kaj jen la lasta tago. Unue vizito al mararkeologia muzeo, kie ni malkovris tiujn romiajn hieroglifojn pri la mazaronanoj. Kaj due la gravega evento: vizito al la bierfabriko "El Aguila". Neniu el ni rememoras, kio okazis tie; eble tio sufiĉas por diveni, kio okazis certe.

Tiu-vespere La Sovagulino trafis nin (la malaganoj kaj sevilĵanoj) precipe en la duŝejo. Kiam Ludoviko kaj mi jam finis la duŝigadon, ĝi aperis senaverte kaj perfide. Eble la timo faligis la bantukon, kiu sole kovris Ludovikon; kaj certe tio savis nin, ĉar ĝi (La Sovagulino) vidante la ludovikan kacon ŝajnis trankviliĝi, kaj kontraŭnature ĝi nek atakis, nek mordis, nek murdis nin, nur riproĉis nin tial, ke ni duŝigas neleĝe en tiu duŝejo (mi ankoraŭ ne scias, kiu estis la stultu1(in)o, kiu metis tiun afiŝeton malpermesante al la viroj duŝiĝi en la 2a kaj nia 4a etaĝo).

Feliĉe La Sovagulino jam foriris el niaj vivoj.

Kaj nokte ni tute "ingiĝis" en la festeno, kie ni multe manĝis kaj denove drinkis; sed antaŭ ol raporti pri tio, mi devas sciigi vin pri la bedaŭrinda perforta sinteno de la LKK-anino, kiu preskaŭ batis min kiam mi pagadis al ŝia edzo la fotojn, kiujn mi petis. Laŭ ŝi mi ĝenis lin, kaj tial ŝi lin defendis; sed miaopinie ŝi nur ĵaluzis, ĉar fakte mi estas pli bela ol ŝi.

Jam mi povas rakonti pri la festeno. Kiel forgesi, kiam Javi metis kremdolĉaĵon sur la seĝo de Alberto, kaj li tute naive sidiĝis sur ĝi! Kiel forgesi, kiam Alberto sin misvenĝis kontraŭ Ludoviko metante sur unu el liaj piedoj ŝinkoskalopon kun majonezo! Kiel forgesi, kiam Ludoviko intencis ĵeti kontraŭ Oscar (por misvenĝi denove) dolĉaĵon! Kiel forgesi, kiam ni kanta-dis jenon:

Pro la polvo de l'vojo
ni havas la buŝon seka,
ni ne volas plian vinon,
ĉar ĝi kapen rapidegas.

Donu la kruĉon,
donu la kruĉon,
pro soif' mortas mi;
tenu forte ĝin,
ĉar povas fali ĝi.

Ha! Neforgeseblan festenon!

Nun vian vicon: ĉu vi vere opinias ĉi tion kongreso?

Fine mi sincere dankas Alberton, Adrian la bahaano, Manolon, kaj Aniceton pro iliaj interesaj prelegadoj.

Kaj mi salutas kace la ulinojn el nia amikaro, la ulojn puge, kaj ĉiujn "inge" kaj profunde.

Pako la 3a
(La lasta kongresano)












NE PAROLU TIOM
KAJ PAGU
KION VI

ŜULDAS!!!

7

BARBE





KONSENTITE!
MI FARIÇOS
MONA HINO.



LA ANO NASKIĜAS SED NE FARIĜAS. LAŬ FIDINDAJ INFORMONTOJ, LA ALIA MANO DE NIA KARA GORBAĈEV FITUŜADIS LA THATĈERAN PUGON.



JEN FRAGA ELIRANTE EL NUDISTA PLAĜO. N FOTISTO KAPTIS LIN SUR RIZE. KIA POSTAĜO!


Definitive. Mi sendos raketon al la redakcio de Ĉiesrevuino.



REAGAN-O
Antaŭ




Kaj



post la operacio.
Ĉu vi vidas diferencon?





VISIO SMARADIGNA

Maresmer
maresmel vad
valma resdar
mares delmer

Deser verdal
vernal damer
adler es mar
verden lervad

Maresmer ver
desmerald dar
dar
ver
verd
verd smerald

J.E. Cirlot


A FOJE AJN FOJES

Foje.
Foje ja.
Foje ja mi.
Foje ja mi pensas.
Foje ja mi pensas ke n.
Foje ja mi pensas ke mi.
Foje ja mi pensas ke mi povas.
Foje ja mi pensas ke mi povas esti.

KOLEKTIVO MI



ta
ien
ge
cta



TXURI URDIN-PERMUTADOJ

Al J.E. Cirlot
(1916 - 1973)

- | | |
|--------|--------|
| Cirlot | Lotcir |
| Cilotr | Locirt |
| Ciotrl | Loirte |
| Citrlo | Lortci |
| Irlote | Otcirl |
| Irotel | Otirle |
| Irtelo | Otrlei |
| Irelot | Otlcir |
| Rlotci | Tcirlo |
| Rltcio | Terloi |
| Rleiôt | Tcirir |
| Rliotc | Tcirlr |

K. MI





D.E.D.O.

SUB LA MAZARRONA ĈIELO KAJ APUD LA BLVA MARO DE KARTAGENO STARIĜIS ARO DA JUNULOJ KONTRAŬ LA NEDRINKEMAJ ORGANIZOJ. JUNAJ GEDRINKEMULOJ KREIS ORGANIZON, KIU LABOREGOS KAJ KLOPODEGOS KE ĈIUT KONGRESOJ, RENKONTIĜOJ, TENDAROJ, KTP DE ESP-O ESTOS GAJAJ, KAJ KE IĜI SUKCESU PER LA VOJO DE DIBOĈO.

TIU NOVA GRUPO POVAS ESTI NOMATA "D.E.D.O.", ĈAR ĜIA NOMO ESTAS "DIBOĈEA ESPERANTISTA DRINKEMA ORGANIZO", BONA NOMO POR LA LABORO, KIUN ĜI DEVAS FARI.

ANKORAŬ NIA DIECLABORA ORGANIZO HAVAS MALMULTAN NOMBRON DA SAVANTOJ, KIUT SAUOS ESPERANTUJON KAJ MALPERMESOS ĜIAN FALADON EN LA ŜLIMON PUTRAN DE LA NEDRINKECO.

SE VI DEZIRAS ESTI UNU EL TIUT SAVANTOJ, VENU KONGRESOJN, KAJ PAROLU KUN IU EL NI.

Nu! Fartu bone, praktiku kaj trejniĝu en la plej proksima trinkejo, drinkejo, aŭ iu ajn simila loko.



NI HAVOS STANDON EN ĈIU KONGRESO POR ARANĜI DIBOĈENOKTOJN. VENU AL NI!!!


SOMERA PAĜO



TIU ESTAS LA FOTO DE ISABEL PREYSLER, KIUN DONACIS AL NI LA FOTINTO (M. BOĜER').

VARMETA MARBORDO

LA PLEJ PROKSIMA, PUREGA, SENARMEULA KAJ PUREGEGA DE LA TRIA MONDO. VENU AL LA STRAN-
DOJ DE MURCIO, KAJ VIZITU ĜIAJN TIPAJN VILAĜETOJN :
MAZARRÓN, LA UNIÓN, TOTANA,
EL PALMAR, KARTAGENO "LANUIT"...
Kaj se vi kuraĝas baniĝi en la
Malaranda Maro...



La kutima varmega somera nokto sevilja, ĉi tio ne ŝanĝiĝas, malgraŭ ke multe da aĵoj jes. Ne, ne, eble antaŭ dek jaroj, kiam la arboj, tiuj belaj arbegoj, estis kun ni, la somernoktoj estis pli freŝaj, eĉ elteneblaj. Ha! Mi ne estas objektiva; por mi estus pli komforte, ke la arboj ankoraŭ restus ĉi tie, nun sen ili mi povas rimarki ĉiujn maldormajn okulojn sur mi, sed antaŭ dek jaroj mi tute ne rimarkis tion, kaj certe neniu rigardo, eĉ serĉanta, trafis min. Tiam mi grimpis ĉi tiun muron tute senpune, tiel, kiel nun, sed pli trankvile.

Ho! Jam aperas la verda frandaĵo ĉaro kaj kompreneble la frandaĵoven distino. Ĝi jam estis ĉi tie antaŭ dek jaroj, kaj ĝi ĉiun somernokton portas tiun verdan ĉaron. Mi ĵus in ventis du proverbojn por difini ĉi tiun aferon: "ĉiu besto havas sian keston" kaj "ĉiu bruto havas sian puton", do mi devas ĉiun somernokton grimpi ĉi tiun muron, kaj ĝi devas vendi frandaĵojn ĉe la pordo de la somerkinejo. Kaj ĉi tiu fenestro markezo plena de florpotoj povas esti mia ĉi-nokta "kesto" aŭ "puto", ha! Kiom stulta mi estas!

Mi ne scias, kial mi eniras en la ĉambron por esplori; povas esti kutimo pro jaroj, ĉi-jare ankoraŭ mi ne trovis ion interesan ene de ĉi tiuj domoj, kaj ĉiam mi devis resti en la florpotoj de la fenestroj. La loĝantoj sendube trovis rimedon por ekstermi la insektojn... kaj min mem.

- Aaahhh!

Ho! Kia voĉego! Mi tre ŝatas la ĉambrojn kun infanoj, ili, kiel mi, ĉiam ĉasas insektojn.

- Paĉjo! Paĉjo!

Tiu voĉo estas knabineta, mi jam vidas ĝin, sed kial ĝi ploras? La homoj ŝajnas esti ĉiam malfeliĉaj.. Mmmm... Ankaŭ ĉi tie haŝisodoras. Preskaŭ duono da ĉambroj, en kiuj mi eniris, havas ĉi tiun odoron. Mi rememoras, ke antaŭ dek jaroj...

- Paĉjo!

Lasu lin, onjo. Eble li fikas, kaj tial li ne atentigas vin. Vi devas alkiĉi esti la lasta aĵo en la mondo, almenaŭ por viaj gepatroj; eĉ kiam vi aperos dekkvinjara kaj graveda, li fajfos pri vi, se i lin ne mankas haŝiso aŭ mono por bi eri strate. Tiu estas la imposto pro naskiĝi en ĉi tiu tria mondo, kiu nomiĝas Andaluzio.

- Kion vi volas, imbecilino?

- Estas laceteto en la ĉambro.

- Kie?

- Tie, vidu!

Fik! Vi estas putineto, onjo! Kion mi faras nun? Sendube li forĵetos min straten, kaj denove mi devos grimpi. Fu!

- Ne forĵetu ĝin, paĉjo! Mortigu ĝin tiel, kiel Mike Hammer.

- Kiel?

- Detranĉu ĝin kapon!


Ho ve! Mi neniam scios, kiom da jaroj mi povos nature vivi. Antaŭ dek jaroj...

Pako la 3a

NOTU: NATO NEN !!!

BAZOT* FOR !!!

* Bazoj, sed ne de vazoj



Pro José Mari Ruiz Mateos,
 pro Milans kaj pro Armada,
 pro Piñar kaj pro Tejero,
 pro Verstrynge kaj pro Fraga.

Pro reakcia episkoparo
 kaj pro la juĝisto Hermida,
 pro "El Alcázar", mia ĵurnalo,
 pro la filo de Ynestrillas

mi vin nomas, MERDON!

(Bako la 3a)


FRRZ

DANKON,
 ANDREO!

LIMERIKO

Usonanino en Sevilo
 vidante Ĥiraldon ekdiris:
 "Ĉu tio estas taŭra kaco?"
 "Ne," oni respondis
 "Ĝi estas de matadoro".

Andreo Sidworth



ESPEREBLE LA POLICO AGOS TIEL
RAPIDE POR ATINGI NIAN ŜTELITAN
MATERIALON, KIEL ĜI AGIS POR
ARESTI LA POVRAŬN PRAVAN URBESTRON
DE MARINALEDA. HONTINDE!!!

KVANKAM ILI ŜANĜIS SIAN KOS-
TUMON, ILI ESTAS LA SAMAJ.

Ĝis la venonta revuo, kiun vi ricevos
el Karcero!!!